

I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNAZIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I.F.E.F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U.E.A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F.E.I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)



Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

N° 3 - 4

Marto - Aprilo 1963-a

13-a Jaro

NEKROLOGOJ

FORPISIS LA HONORA PREZIDANTO DE I.F.E.F.

La 28-a de Januaro mortis en Amsterdamo en la aĝo de 66-jaroj nia kara amiko:

WALIG STAPEL

HONORA PREZIDANTO DE I.F.E.F.

La nomo de Prezidanto Stapel estas ligita al la evoluo de I.F.E.F. kiun li gvidis dum longaj jaroj.

Ni italaj Fervojistoj-Esperantistoj kortuŝe ploras la grandaniman amikon, ŝiam bonumora kaj bonintenca, kiu per siaj entuziasmaj kongresparoladoj instigis multajn el ni al aktiveco kaj persisto en nia afero.

Kun kortuŝitaj sentoj ni sendas al la gefamilianoj la plej sincerajn kondolencojn.

Ni ploras ankaŭ la elmondiĝo de du niaj fidelaj membroj:

LA PILA p.i. Luigi

Kordolore trafis nin la sciigo de la subita morto de nia membro S-ro LA PILA p.i. Luigi okazinta la 20-ande februaro en Milano. Ni ne sukcesas trovi taŭgajn vortojn por esprimi nian doloron. Nia amiko mortis tiel subite ke nia penso estas ŝokita pro tia grava perdo. Kvankam ne fervojisto li estas delonge ano de Itala Fervojista Esperanto-Asocio.

Al la entombiga ceremonio I.F.E.A. estis reprezentita de nia membro G. Quarone. Al la gefamilianoj kaj al la Milana Esperanto-Grupo, de kiu li estis elstara kolumno, ni sendas la plej kortuŝajn kondolencojn.

Kav. FILIPPI Rag. Ermanno

La 11-ande marto nova kosterniga sciigo trafis nin. En Romo ĉesis la bato de la grandanima koro de Kav. Rag. Ermanno FILIPPI, eksfervojisto kaj olstara propagandisto de Esperanto.

Ni memoras lian longe daŭran aliĝon al nia Asocio ekde sia fondiĝo kaj la ŝiujarajn Esperanto-kursojn ĉe la Roma Popola Universitato. Dum longa tempo li estis reprezentanto de Universala Ligo por Italujo.

La Itala Fervojista Esperanto-Asocio, kiu estis reprezentita al la ontombiĝo de nia ano A. De Salvò, ploras la perdon de elstara kolego kaj amiko.

Memore de nia priplorata Fervojisto-Esperantisto Ermanno Filippi, Radio Roma, on la rubriko "Kuriero de Esperanto" de la 13-a de marto 1963-a, dissendis jene:

LA ITALA ESPERANTISTARO FUNEBRAS: MORTIS ERMANNO FILIPPI

La 9-an de marto matene, post mallonga malsano, forpasis en Romo, je la aĝo de 76-jaroj, nia kara samideano kaj amiko Ermanno Filippi, veterano de la Esperanto-movado.

Naskiĝinta en la Eterna Urbo la 13-an de julio 1886-a, li lernis Esperanton en 1906-a, kaj li estis unu el la unuaj membroj de la Roma Grupo. Ek de tiam li dediĉis sian tutan liberan tempon al la disvastigo de la internacia lingvo, funkciante ankaŭ dum multaj jaroj kiel kasisto kaj sekretario de la Grupo.

En 1925-a li gvidis la unuan kurson de Esperanto per radio, kaj multajnaliajn kursojn li gvidis en pluraj lernejoj kaj ĉe la Popola Universitato. Kiam pro ne bona faro li ne povis eliri, lia hejmo fariĝis lernejo de Esperanto. Cetere al sia hejmo li ofte invitis gesamideanojn italajn kaj eksterlandajn por familiaj kunveno, ĉe kiuj li ankaŭ aŭskultigis surbendigitajn kantojn de italaj kanzonoj en Esperanto.

Dum multegaj jaroj Ermanno Filippi estis delegito de la Universala Esperanto-Asocio, kaj ĉiuj gesamideanoj, kiuj vizitis Romon, trovis en li ĉiam afablan gvidanton kaj gastaman bonhumoran amikon. Kun granda sindono kaj zorgemo dum longa tempo li estis ankaŭ reprezentanto de la Universala Ligo por Italujo.

Li kunlaboris en pluraj Esperanto-gazetoj per artikoloj originalaj aŭ tradukitaj, kaj li tradukis en italan lingvon la raporton pri Esperanto de la Ĝenerala Sekretariejo de la Societo de la Nacioj. Kiam liaj sankondiĉoj tion permesis, li partoprenis ĉiujn naciajn Esperanto-Kongresojn, kaj la internaciajn, kiuj disvolviĝis en Italujo: li estis membro de la Organiza Komitato de la 27-a Universala Kongreso, kiu havis lokon en Romo en 1935-a, kaj de tiu Internacia Katolika, kiu same okazis en Romo en 1950-a; en la lasta Katolika, okazinta ĉe la "Centro por pli bona mondo" apud Romo en aŭgusto 1962-a, li donis sian kunlaboron kiel kasisto.

Pro sia multflanka entuziasma agado li havis multegajn geamikojn en la tutmonda esperantistaro, kiuj kun ĉagreno ekscios pri la forpaso de tiu fervora samideano.

La 10-an matene, la meso celebrata de Pastro Jacobitti en la kripto de la preĝejo de Kristo Roĝo por la Katolikaj Esperantistoj estis dediĉita honore al Ermanno Filippi. Tuj poste, la partoprenintoj kunvenis kiel kutime en apuda salono, kie Luigi Minnaja per kortuŝaj vortoj memorigis la ĉefajn trajtojn de la neforgesebla amiko.

La funebra ceremonio, okazinta la 11-an posttagmeze, ĉeestis tre multaj romaj gesamideanoj, kiuj sekvis la ĉerkon kovritan per la Esperanto-flago.

Sur la freŝan tombon de la kara amiko ni demetas niajn larmojn kaj niajn florojn.

Al la funebranta familio Filippi ni esprimas niajn plej varmajn profundajn kondolencojn.

La Milana Esperanto-Grupo memorigis nian membron Luigi LA PILA per jenaj kortuŝaj vortoj de ĝia Prezidanto Felice Bertolotti en "Boiletino di Informazione":
Gino LA PILA mortis

Unu el ni forlasis nin por ĉiam, Gino La Pila ne plu estos kun ni. Preskaŭ ni ne sukcesas trovi la taŭgajn vortojn por esprimi nian doloron. Nia amiko mortis tiel subite kaj nia penso estas ŝokita pro tia grava perdo.

La anoj de la Milana Esperanto-Klubo certe longe suferos pro tiu perdo, ĉar jam de nekalkulebla tempo ni estis plezurigitaj per lia ĉeesto ĉie kaj ĉiam. Gino La Pila estis konvinkita Esperantisto; kiu lin konis, scias ke li estis kvieta, sed persista, nelacigebla batalanto por nia idealo. Li estis ĉiam en bona akordo kun ĉiuj kaj lia bonkoreco estis ofte la peranto por akordigo en disputoj de la aliaj. Li apogis kaj subtenis plurajn iniciatojn, li estis ĉiam preta helpi, organizi, konsili por la bona sukceso de nia laboro. Ankaŭ ĉi tiu "Bulteno" ŝuldas al li la naskiĝo, kaj ĝuste pro lia pasia laboro la bulteno informas jam de pluraj jaroj nin ĉiujn.

Ni opinias ke la memoro de Gino La Pila restos en nia klubo kaj en la tuta esperanto-mondo dum longa tempo. Ni esperas ke la memoro de lia agado, de lia sinteno, de lia konduto, restu ĉiam kun ni kaj helpu nin por la bona solvo de nia problemoj kaj gvidu nin en la spirito de nia idealo.

FELICE BERTOLETTI

NOVA PRUVO DE SIMPATIO POR ESPERANTO-MOVADO FARE DE LA URBESTRO DE BOLOGNA HON.G.DOZZA

La Urbestro de Bologna Hon. Giuseppe DOZZA, donacis omaĝo, al nia Esperanto-Grupo tre interesan Ĉinan Antologion kune kun Bulgara volumo, akompanante la donacon per jena ĝentila letero: Al Sinjoro Prezidanto de la Esperanto-Grupo - Bologna

"Mi ricevis la aldonitajn Esperanto-librojn pri Ĉinio kaj Bulgario, kie la lernado de Internacia Lingvo estas multe disvastigata.

Mi permesas ilin donaci omaĝo, al la Bologna Esperanto-Grupo kune kun la plej varmaj bondeziroj por fruktodona laboro kaj ĉiam pli profunda aktiveco.

Kun aparta konsidero, akceptu miajn plej korajn salutojn.

Giuseppe DOZZA

LASTAJ NOVAĴOJ DE LA 15-a INTERNACIA PERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

EN STOKES-ON-TRENT, inter la 11-a kaj 17-a de majo 1963. Bankkonto, ML.12.C.W.S.
Korespondadreso: S-ro Horace BARKS, 24 Marsstreet, Smallthorne, Stoke-on-Trent, Britio
Landa Kongresa Komitato: Prezidanto: Horace BARKS, Sekretario: R.W. DEAKIN, Kasisto:
T.C. TASKER.

3-a KOMUNIKO

ĜENERALAJ INFORMOJ

Vojaĝbiletoj: Ĉiuj, kiuj ne intencas iri pli nordon, petu biletojn senpagajn al Llandudno laŭ Stoke-on-Trent. Stoke ne estas sur la rekta linio inter Londono kaj Llandudno. Al tiuj, kiuj intencas poste iri al Skotlando, ni konsilas peti biletojn al la pli norda celo, laŭ Stoke-on-Trent, kaj aĉeti kvaronprezan bileton de Stoke-on-Trent al Llandudno por la tuttaga okskurso.

Glumarkoj: Belaj kongresaj glumarkoj estas nun haveblaj ĉe Barks. Prezoj: 100 por 5 ŝilingoj, 50 por 2 ŝ. kaj 6 pencoj, 25 por 1 ŝ. kaj 6 p. Du esperantaj steloj egalas unu anglan ŝilingon (shilling). Angla mono: 12 pencoj egalas 1 ŝilingon, 20 ŝilingoj egalas 1 funton sterlingan.

Kongresstampo: La poŝtoficiaj instancoj konsentas provizii stampilon kun kongresa simbolo, sed ni ne povas persvadi ilin eldoni specialan poŝtmarkon.

Urba akcepto: Dum la urba akcepto (merkredon) antaŭ la internacia balo, la konsilanto regalos la kongresanaron, kaj tio anstataŭos la komunan vespermanĝon menciitan en la dua komunikilo. Dum la balo, post montrado de dancoj de variaj landoj, oni esperas montri novan dancon de Esperantio. Fraŭlino Martyn Johns, kiu prizorgas la dancojn, nun klopodas elverki la novan dancon. Oni nur serĉas malnovan muzikaĵon nomitan "Esperanto". Ĉu iu IFEF-ano ion scias pri ĝi? Se jes bonvolu informi Barks.

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - SOFIO - 3-10 VIII 1963

Sub la Alta Protoktado de la Unua Vicĉefministro de Bulgarujo, GEORGI TRAJKOV.
Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Dua Bulteno: Al ĉiuj aliĝintoj estas sendita la Dua Oficiala Bulteno. En ĝi troviĝas ĝeneralaj informoj pri la Kongreso, ties kompleta provizora programo, programoj de la Infana Kongreseto, Osho-Seminario, Junulara Kongreso en Vraca, plenaj informoj kun mendilo por loĝado, okskursoj kaj bankedo. En la Bulteno troviĝas krome informoj kaj regularoj pri la Oratora kaj Belarta Konkursoj.

Vizo por Bulgarujo: Kolikaj kongresanoj demandis, ĉu necesas montri atestilon pri pagitaj hotelkostoj por povi ricevi la vizon. Tio ne estas necesa. Laŭ cirkulero n^o. 42694 de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj la Ambasadoj kaj aliaj bulgaraj diplomataj reprezentantoj en eksterlando (ili estas menciitaj en la Dua Bulteno) donos la enirvizon kontraŭ prezento de la kongreskarto. Kiel jam menciite, la kongresanoj ĝuas ankaŭ 50 % da rabato je la kosto de la vizo.

Programo por neesperantistoj: En kunligo kun la Arta Festivalo, la Loka Kongresa Komitato estas aranĝanta, kunlabore kun la bulgaraj kulturaj instancoj, specialajn prezentadojn por neesperantista publiko. Tiujn prezentadojn partoprenos kunlaborantoj en la Arta Festivalo. Por la okazo estos aranĝita speciala "Somajno de Internacia Amik."

Infana Kongreseto: Ni atentigas la interesigantojn ke la Loka Kongresa Komitato estas devigita limigi la nombron de la aliĝoj por la 8-a Internacia Infana Kongreseto. Pro tio ĝi instigas al kiel eble plej baldaŭa aliĝo. Informoj kaj aliĝiloj troviĝas en la Dua Oficiala Bulteno kaj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la 48-a U.K.

Statistiko (ĝis 14-3-1963): Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 20, Belgujo 35, Brazilio 2, Britujo 77, Bulgarujo 560, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 43, Finnlando 37, Francujo 213, Germanujo (Okc) 86, Germanujo (Or) 22, Hispanujo 6, Hungarujo 79, Islando 2, Israelo 1, Italujo 122, Japanujo 5, Jugoslavio 24, Kanado 2, Madagaskaro 1, Maroko 2, Meksiko 4, Monako 3, Nederlando 93, Nigerio 2, Norvegujo 8, Nov-Zelando 4, Pollando 270, Rumanujo 1, Sovetunio 41, Svedujo 106, Svislando 10, Usono 9, Entute 1899 el 36 landoj.

G.G. POMPILIO - Konstanta Kongresa Sekretario.

N A S K I Ĝ O

Kun ĝojo ni sciigas la naskiĝon de EVA FORMAGGIO unua filino de la internacia novfondita Esperanta familio: Rag. Aldo FORMAGGIO- fervojisto en Torino (Italio) kaj de longe membro de Itala Fervojista Esperanto-Asocio, kaj Prof-ino Elisabetta VILLISCI-jam direktorino de la Ŝtata Fervojista Edukinstituto en Kaposvar (Hungario). Torino, la 2-a de marto 1963-a.

TRA GERMANIO PER FEDERACIA FERVOJO

Al miloj da prospektoj kaj faldfolioj de la ĉiuj naciaj Ŝtat-fervojoj, lastatempe estis aldonita la oka prospekto kiun Germana Federacia Fervojo eldonas Esperantlingve:

"TRA GERMANIO PER FEDERACIA FERVOJO"

La prospekto estas havebla senpage, bonvolu vin turni al jena adreso: Germana Esperanta Fervojista Asocio-Sekretariejo-6 FRANKFURT/M 9 Karlstr. 4-6 (Germanio).

Ĝi estas belega kaj bunta broŝuro kiu montras ne nur la verdan pejzaĝon, ne nur la urbonomojn de la Respubliko, sed ankaŭ la monumentojn kaj la precipajn karakterizojn de ĉiu el ili: kun densa fervoj-reto kiu kunligas taŭge unu al alia. Tiu fervoj-reto (kompletigita per aŭtobusoj kaj ŝipetoj laŭlonge de la Reno) estas vere komforta, rapida, sekura, kaj logas viziti Germanion, landon variviĉan kaj pro tio belega. Vojaĝi estas bele, sed precipe per taŭgaj fervojveturiloj, laŭ belaj linioj en komfortaj kupeoj, kiajn prezentas la Germana Federacia Fervojo.

MANIFESTACIOJ POR LA CELEBRADO DE LA UNUA CENTJARO DE LA URBO PORTO EMPEDOKLE (Agrigento Sicilio-Italujo) INAUGURO DE NOVA ESPERANTO--STRATO-- 21-an de aprilo 1963-a

Danke al interesigo de la lokaj esperantistoj, D-ro Giuseppe Sinesio, Urbestro de Porto Empedokle kaj fervora Esperantisto, proponis al la urba konsilantaro la titoligo de nova urba strato al nia lingvo. Dum la konsilantaj laboroj de la 4-a de aprilo, la urba konsilantaro de Porto Empedokle unanime aprobis la proponon de la Urbestro kaj decidis inauguri la novan straton la 21-an de aprilo, okazo de la manifestacioj por la Unua Centjaro de la Urbo. La tre laŭdinda decido estas tre grava por nia movado, tial estus oportune ke ĉiuj amikoj de la Esperanto-Movado gratulus nian Urbestron per afablaj leteroj aŭ gratulkartoj. Oni skribu al la jena adreso: D-ro GIUSEPPE SINESIO-Sindaco di Porto Empedokle - AGRIGENTO - Sicilio (Italujo).

5-a ESPERANTA MANTOVA TAGO

La 12-an de majo 1963-a okazos en Mantova la 5-a Esperanta tago. Kiu deziras partopreni povos sin turni, kaj doni sian aliĝon al sia urba Esperanto-Grupo, aŭ rekte al Mantova Esperanto-Grupo-Via Sacchi, 25 MANTOVA.

3-a INTERREGIONA ESPERANTO KUNVENO EN MODENA

Post kelkaj jaroj Modena Esperanto Grupo reokazigos la 26-an de majo venonta sian interregionan kunvenon en kiu estas invitataj partopreni ĉiuj esperantistoj aŭ grupe aŭ individue. Sed aparta invito estas al la gejunuloj al kiuj la kunveno - ĝuste okazonta en la jaro deklarita de U.E.A. "JUNULARA JARO" - dediĉos specialan aranĝon: Oratoran konkursoŝ. Jam de nun bonvolu rezervi sur via agendo la dimanĉon --26-an de majo-- por la Modena kunveno. Dankon. MODENA ESPERANTO-GRUPO.

N E K R O L O G I O

Lastmomente trafis nin dolorigan novaĵon: La 12-an de marto mortis en la aĝo de 79-jaroj nia samideano kavaliro Alberto Tognetti. fervoja pensiulo kaj membro de nia Asocio dum longaj jaroj. Krome li estis fakdelegito de U.E.A. en Firenze, kaj ano de F.B.I.

Ni memoras lin kiel membron de Itala Fervojista Esperanto-Asocio kaj Sekretarion de la 30-a Nacia Itala Kongreso de Esperanto kiu okazis en Firenze dum septembro 1959-a. Dum tiu Kongreso li estis la kerno de la organizado.

I.F.E.A. kortuŝe funebras la forpason de sia fidela ano.

ESPERANTO EN LA RADIO--RADIO ROMA Esperanto-Tako, Casella postale 320 ROMA (Italia)

DISSENDOJ EN ESPERANTO - Jaro 1963-a - Ĉiujn merkredojn: KURIERO DE Esperanto.

MAJO 1963-a - vendredon la 3-an: Vizito al la Reĝa Palaco de Caserta; mardon la 7-an: Tra la literaturo; vendredon la 10-an: Italaj literaturaj ĉefverkoj en la universala literaturo;